

N°186
mai
juin
juillet
2019

LA INFORMILO

N° 186
majo
junio
julio
2019

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

ESPERANTO 2019

Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18€

Reta abono: 7,50€


**La chanteuse
Chiara (Kjara)
Raggi,
ambassadrice de la
culture italienne et
de l'espéranto.**



Le thème du concert de Chiara Raggi organisé à Wintzenheim (Alsace) par Monsieur Michel Basso, le dynamique président de l'association TAKE-Esperanto, l'association mondiale des espérantophones du bâtiment, s'intitulait: "**Chiara Raggi apporte à la France ses sonorités italiennes**". L'auteure-compositeure-interprète a présenté un concert pour voix et guitare, faisant ainsi découvrir à une salle conquise dès les premières notes des sonorités qui puisent dans la tradition italienne d'auteure-compositeure contaminée par le jazz avec une spontanéité unique en son genre. Chiara a gagné le Prix Suoni dall'Italia et était finaliste au Prix Bianca d'Aponte 2018, qui consacre la chanson d'auteur. Et lors de ses concerts: une présence sur scène d'une grande artiste!

Elle a à son actif deux albums et un single: **Molo 22 (2009)**, **Disordine (2015)** et **Lacrimometro (2017)**. Pour son dernier projet discographique, dont le titre est **Blua Horizonto**, Chiara (Kjara) a choisi la langue internationale **Espéranto**.


35a PSI esperanto



Printempa Semajno Internacia en Hochspeyer de la 15a ĝis la 22a de aprilo 2019

Jen alia internacia semajno okazanta regule ĉiu-jare en Germanio, en la semajno antaŭ aŭ eventuale post Pasko. Ĉi-jare ĝi okazis relative proksime de la franca landlimo, en Palatinato, en la urbeto Hochspeyer. La junulargastejo en la arbaro estis ege komforta kaj tute taŭga por akcepti partoprenantojn, plej ofte familiojn kaj infanojn. Tamen ĉi-jare la nombro da partoprenantoj estis iom malpli altaj ol en antaŭaj jaroj.

La programa skemo de la semajno konsistas el diversaj prelegoj aŭ manaj aktivajoj en la mateno kaj turismado en la posttagmezo. Krome estis ankaŭ proponita tuttaga ekskurso.



Jen interesa sperto, kiel funkcias 3-dimensia printilo. Laura Klünder funkciigis sian printilon por krei malgrandan objekton. La principo konsistas en daŭra aldono de materio laŭ iu komputila programo. La dekstra bobeno malrapide liveras la materion al la printilo. La bazo povas moviĝi, same kiel la print-

kapo. Tamen necesas pacienci por realigi etan objekton. Jen interesa kaj kreiva hobbio.



Dank'al oportuna semajna "Palatinata bileto", eblis veturi senpage per busoj kaj trajnoj en la regiono de Palatinato.

En Kaiserslautern eblis ĝui la kvietan etoson de ĉarma japana ĝardeno. Ĝi situis preskaŭ en la urbocentro ĉe monto-flanko. Ĉiuj libere vagadis tra la ĝardeno kaj poste troviĝis en la urbo-centro. Baldaŭ eblis uzi la planitajn busojn kaj trajnojn por atingi antaŭ la vespermanĝo la junulargastejon.



ĉiĉeronino invitis la gastojn al gustumado de regiona vino.

En la posttagmezo ni vizitis la kastelon Hambacher-Schloss. Ĝi estas konata, ĉar tie komenciĝis la germana revolucio en 1832. Konstruita en la mezepoko kiel burgo ĝi iĝis kastelo. En 1982 oni rekonstruis ĝin kaj malfermis modernan kastelon.



François Housounou prezentis sian landon Benino. Tie funkcias la Esperanto-centro ACM (A f r i k a C e n t r o Mondcivitana). Ĝi ankaŭ disvastigas Esperanton en la lando. En alia prelego li prezentis la venontan Afrikan kongreson en Burundio.



La oficiala lingvo en Benino estas la franca, sed fakte ekzistas pli ol 60 lokaj lingvoj en la lando.

Grandaj, grandegaj nombroj kaj eĉ pli grandaj nombroj

Jen ege interesa prelego de Klaus Rumrich.

Ĉu vi opinias, ke miliardo kaj triiliono estas grandaj nombroj. Ni rigardis multe pli grandajn nombrojn, tamen kiel skribi ilin, tamen ne per kutima maniero.

En aliaj prelegoj li klarigis, kiel mense multipliki plurciferaĵajn nombrojn per diversaj manieroj. Kiel kalkuli la tagon de la semajno por iu ajn dato. Sur alia paĝo estas montrita la principo.

Jen la ŝaktabulo kun 1 grajno de rizo sur la unua kampo kaj ĉiam la duoblo sur la ceteraj. Entute la tabulo enhavas 18.446.744.073.709.551.6215 grajnoj. Ĉu realigebla? Certe ne, ĉar tio estas ĉirkaŭ 370 miliardoj da tunoj da rizo.

7205759	1441151	2882303	5764607	1152921	2305843	4611686	9223372
4037927	8807585	7615171	5230343	5046068	0092136	0184273	0368547
900	6000	2000	3000	50000	90000	90000	90000
3814789	5629499	1125899	2251799	4503599	9007199	1801439	3602879
7671065	5342131	9068426	8136852	6273705	2547409	8509482	7018964
8	2	20	50	80	90	000	000
1099511	2199023	4398046	8796093	1759218	3518437	7036874	1407374
627776	255552	511104	022208	6044416	2088832	4177664	8355532
4294967	8589934	1717986	3435973	6871947	1374389	2748779	5497558
296	592	9184	8368	6736	53472	06944	13888
1677721	3355443	6710886	1342177	2684354	5368709	1073741	2147483
6	2	4	28	56	12	824	648
85536	131072	262144	524288	1048576	2097152	4194304	8388608
256	512	1024	2048	4096	8192	16384	32768
4	2	4	8	16	32	64	128



En ia posttagmezo estis proponite vizito al Modelfervojoj. Fakte ĝi okazis en la ĝardeno de amiko de Helmut Klünder. Ni estis afable akcetitaj kaj povis admiri la tutan instalaĵon kun pluraj paralelaj reloj, stacidomoj kun divers-tipaj lokomotivoj, kiuj funkciis sur granda cirkvito.



La vesperaj programoj estis variaj kaj abundaj. Eblis ĝui la koncerton de Kim kun liaj konataj kantoj "Ska-virino", "En la Mateno", "Sola, sola" kaj pluraj aliaj.

La kostuma balo havis kiel temon la "arbaro". Krome ankaŭ aperis ĉarmaj sorĉistinoj, ĉu tamen timigaj? Christoph Frank sukcesis kapti la atenton de la infanoj kaj ankaŭ de la cetera publiko. En lia teatraĵo estis miksaĵo de homo kaj pupoj:

Jen "Festo por Findus" Kiel fari naskiĝ-tagajn kuketojn, se la kokinaro strikas kaj ne demetas ovojn. Ĉu tiam ĉio fiaskos?? Tamen amuze solviĝis la problemo.





Bad Dürkheim estas bela vinurbo kun interesa kurac-loka parkon. Tie troviĝas sal-kolekta muro: temas pri instalaĵo el granda ligna kadro, en kiu enplektiĝis multaj arbustaj branĉetoj (ĝenerale de pruneloj). De supre malsupren la brancetojn trafluas sala akvo, kies saleco dum la trafluo

altiĝas pro la forvaporigo de akvo. La koncentritan sal-akvon oni fine boligis por forvaporigi la restintan akvon kaj izoligi la salon. La aero proksime de tiaj sal-kolektaj muroj estas sanige saturita je saloza vaporo, aparte bona por pacientoj kun astmo kaj aliaj pulmaj malsanoj. Tial, (aparte dum la 18a kaj 19a jarcento) multaj kuracaj urboj en lokoj kun naturaj fontoj de saloza, saniga akvo starigis tiajn sal-kolektajn murojn en urbocentraj parkoj kun duobla efiko kaj de kuracado kaj de sal-kolektado.

En sabato ni veturis al Kaiserlautern. Tie vizitindas la ĝardena ekspozicio. En la enireja halo troviĝas jam de 2015 ege granda ekspozicio de LEGO-brikaj modeloj. Eblis admiri mult-fame konatajn monumentojn faritajn nur per LEGO-brikoj. Jen la katedralo "Nia Sinjorino de Parizo"



Ekde 2002 dise tra la ĝardeno estis starigitaj realgrandaj dinosaŭraj modeloj. Nun ĝi estas jam la plej granda ekspozicio de dinosaŭro-modeloj en Eŭropo.



Sabate vespere okazis la Paska Fajro antaŭ la junulargastejo. Eblis baki brioĉojn.

En dimanĉo estis planita la ovo-serĉado. Tamen malgraŭ bela vetero, ĝi okazis en iu salono.

Ĉarmaj leporinoj kunigis ĉiujn ĉokoladajn ovojn kaj ilin disdonis al la infanoj.

Jen jam la lasta tago de tiu agrabla semajno, kiu finiĝas per la Internacia vespero. Skeĉoj, ŝercoj, muzikaĵoj kaj multaj dankoj al la organizantoj.

Jam anoncita la 36a PSI okazos en 2020 en Wittenberg



Raporto kaj fotoj de Andreo



François Hounsounou partoprenis la semajnon en Hochspeyer. Intertempe li hejmenflugis al Benino. Jen pri lia vojaĝo en Eŭropo kaj ĉefe Germanio.

François celis partopreni la Printempan Semajnon Internacian (PSI). Por atingi Hochspeyer, li rondvojaĝis kaj prelegis pri la Afrika Centro Mondcivitana en Benino kaj pri la 7a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA en Munkeno kaj kafoklaĉis en Ulm. En tiuj urboj li konatiĝis kun aktivaj esperantistoj. Li instigis ilin partopreni, aŭ helpi la okazigon de la afrika kongreso, kiu okazos en Burundo. La munkena klubo finance subtenis la familion de François en ĉeesto de Lars Sozuer, kiu multe sciis pri la familio. Multaj demandoj estis responditaj pri Afriko, kaj Esperanto. Li rezignis respondi al demandoj rilate kelkajn personojn en Afriko pri Esperanto. Li estis gastigita de Uli Ender, Karl kaj Emma Breuningen. Ili vizitigis al li la plej belajn vidindaĵojn en Munkeno, Augsburg. Estis neforgesebla renkontiĝo. Multan dankon al la munkenaj klubanoj.



La 15an de aprilo, François entrajniĝis kaj atingis Hochspeyer. Je sia granda surprizo pozitiva, li estis akceptita de sia malnova amiko, Helmut Klünder. Tiu lasta veturigis lin al la junulara gastejo, kie okazos PSI. Ĉe la akceptejo, estis nova surprizo. Tiu amiko estis la samĉambrano de François. Dum la tuta periodo tiu amiko zorgis pri li kvazaŭ lia propra patro, same kiel faris en Munkeno kaj en Ulm Uli, Karl kaj Emma.

La programeroj vere komenciĝis marde. Diversaj prelegoj okazis en la sama horo kaj malsamaj lokoj. François trifoje prelegis: ĵaŭde pri Afrika Centro Mondcivitana sub la temo "kian rolon ĝi ludas en esperantujo?", vendrede estis pri "la 7a- Afrika Kongreso de Esperanto de UEA en Burundo" kaj sabate laŭ la temo "la beninaj lingvoj". Ĉiuj partoprenantoj interesiĝis pri la tri prelegoj. François respondis al tiklaj demandoj rilate la afrikan kulturon kaj poste pri la kongreso kaj pri la politika situacio en Burundo. La respondoj de François certigis al kelkaj partoprenintoj surloke esplori la flugon al Burundo. Kelkaj deziris vojaĝi al la 7a kongreso, sed iuj preferis helpi per pago de la aliĝkoto. Iu proponis, ke la Afrika Fondaĵo havu konton por pli faliĉigi monĝirojn.


François promesis al ili ĉion sciigi, kiam li hejmeniĝos. Li dume estis en kontakto kun Émile Malanda, la kunordiganto de Afrika Komisiono, Jérémie Sabiyumva en Burundo, la ĉeforganizanto kaj Fernando Maia, la UEA-estrarano pri Afriko. Tiu kontakto permesis al li levi kelkajn demandojn.

La 22an de aprilo estis la disiĝo. Ni adiaŭis nin kaj rendevuos en Buĵumburo, en Afriko.

Estis lia dua partopreno al PSI. La unua okazis en St-Andreasberg.

Li havas egan pozitivan impreson pri tiu aranĝo. Li distance observadis la organizantojn. Estis ĉiam ridetoj okule kaj buŝe inter ili. Li neniam rimarkis iun moŝtulon inter ili. Li notis tre bonan etoson inter ili kaj la aliaj. La nura aĵo, kiun li antaŭe ne sciis estas, ke PSI estas familia renkontiĝo. Pluraj venis kun sia familio. Estis bele. Li vere admiris la tutan teamon. Entute estis 73 partoprenintoj inter kiuj François estis la nura afrikano.

Por fini indas danki s-rojn: Ulrich Brandenburg, Ralf Haumer, Uli Ender, Karl & Emma, Klaus Rumrich, familion Fischer, Lars Sozuer, Tuomo Grundstrom, Helmut Klünder kaj Fernando Maia, kiuj iamaniere subtenis la vojaĝon, gastigis lin. Dio benu kaj protektu ilin.



Raporto kaj fotoj de François Hounsounou



En Andaluzio en la urbo Malago situanta ĉe la Marbordo de la Suno okazis eĉ tri kongres-aranĝoj komence de majo. La 78-a Hispana Kongreso, la 21-a Andaluzia Kongreso kaj la 71-a IFEF-Kongreso. La eventojn partoprenis ĉirkaŭ 180 geesperantistoj el 22 landoj. La plej foraj partoprenantoj



venis el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Meksiko. Regis tre agrabla internacia etoso.

La unua IFEF-kongreso en Hispanio okazis en Barcelono en la jaro 1909. La ĉefa kialo elekti Hispanion kiel kongreslandon estis deziro festi tie la 110-an jubileon. Al tio forte strebis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Ŝi sukcesis konvinki esperantistojn en Malago, ke ili organizu la kongreson en sia lando. La elekto estis bona; agrabla ĉemara urbo, bela suna vetero, konvena kongresejo en Dioceza Domo, kie ĉio okazis sub sama tegmento.

La programo estis varia kaj riĉa je diversaj prelegoj, atelieroj, ekskursoj





kaj artaj vesperaj programeroj. La inaŭguro okazis en granda salono kun partopreno de la reprezentantoj de ĉiuj asocioj. HEF (Hispana Esperanto-Federacio) estis reprezentata de Tonyo del Barrio, AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) de Ángel Arguillos kaj IFEF de Rodica Todor. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de UEA kaj la urba skabenino pri kulturo. Post bonvenigaj vortoj kaj salutoj de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj, la kongreso estis malfermita. Poste okazis komuna fotado.



Inter la partoprenantoj ĉeestis eminentaj personoj: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. L. Zamenhof, Seán Ó Riain irlanda diplomato en Vieno, Katalin Kováts, fakulino pri lingvistiko kaj Esperanto-instruado, Federico Gobbo doktoro pri informadiko kaj komunikado kaj du estraranoj de UEA-por nomi nur kelkajn.

Okazis ĝeneralaj, fakaj, komitataj kaj estrar-kunsidoj, estis preparolataj movadaj aferoj kaj strategio pri la estonteco de IFEF.

Estis elektita nova estraro por tri-jara periodo. Interesis nin prelegoj rilataj al fervojo: “La AVE (hispana grandrapida trajno) al Mekko”, “Hyperloop” (morgaŭa fervojo), “Veturado tra la interplaneda spaco”, “110-a jariĝo de la internacia fervojista movado”. Surpriza estis sciigo pri projekto de Esperanto-stacio en forlasita stacidomo *Halbe* ĉe


Berlino. Estis prezentataj venontjaraj kongres-lokoj. IFEF kongresos en Germanio en *Frankfurt an der*

Oder kaj en pola urbo *Stubice* situanta trans ponto ĉe la germana limo. Samtempe okazos la germana kaj la pola kongresoj.

Interesaj estis debatoj kaj prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj: “La angla lingvo en la Eŭropa Unio post la Briteliro”, “Projekto Erasmus”, “Kiujn fremdlingvojn oni instruas en EU?”, “La homo sur la Luno”, “Ĉu EU vere havas 24 oficialajn lingvojn?”

“Enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon ĉe EU”. Esperantan Katedron en la Amsterdama Universitato prezentis Federico Gobbo, pri la projekto “Esperanto-plaĝo” en hispana ĉemara urbo *Cullera* parolis Dennis Keefe.

Krome okazis ateliero pri informadiko, pri arĥivado





kaj pri mikro-rakontoj. Eblis partopreni Esperanto-kursojn kaj KER-ekzamenojn. Pri la libroservo zorgis Mariló Torres kaj Conchi Fernández. Pri aŭkcio okupiĝis Tonyo del Barrio, Katalin Kováts kaj Margareta Zaleski-Zamenhof. Vendiĝis ĉiuj proponataj objektoj por la profito de la kongreso. En la loka ĵurnalo “La Opinión de Málaga” aperis ampleksa artikolo kun fotoj pri la kongreso kaj pri Esperanto.

Tuttagaj ekskursoj gvidis nin al urboj Rondo, Granado, Kordovo kaj *Madinat al-Zahra*. Duontaga ekskurso celis la

urbon *Antequera*. Plaĉa estis faka ekskurso al fervojlinio en *Zafarraya*, kie ni ĝuis veturon en trajneto tirata per eta vaporlokomotivo. Ne mankis urbovizitado al Malago kaj al ĝia bela botanika ĝardeno.

Dum la semajno okazis abunda, tre varia kaj altkvalita muzika kaj arta programo. Vesperan programeron “Vivu la teatro” reĝisoris Miguel Fernández kaj Ana Manero. Andaluzian muzikon ni ĝuis kun Rocío Alba, Pedro Carrillo kaj Concerto Málaga. Per Esperanto-muziko kaj kanzonoj regalis nin Grazia Barboni, Kajto kaj per ciganaj kantoj Saša Pilipović. Li ankaŭ impone kaj profesie prezentis monodramon pri Galileo. Ĉe la fermo estis transdonita la IFEF-flago al la reprezentantoj de Germanio, kie okazos la transpona Esperanto-kongreso: germana, pola kaj fervojista de la 29-a de majo ĝis la 5-a de junio 2020. Vi estas invititaj partopreni ĝin.


En ĉi-kongreso ni ĝuis emociplenajn



momentojn, internacian kaj amikeman etoson. Koran dankon al niaj andaluziaj samideanoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro agrabla semajno en Malago!

Ege interesa estis la tritaga postkongresa ekskurso al norda Maroko, kiun ĝuis k v a r d e k t r i gesamideanoj. Ni traveturis la urbon Ceuta kaj vizitis la urbojn Tetouan, Asilah, Tanger kaj Chaouen.

Liba Gabalda

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>	S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie Vic-prezidanto</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ro Robert KUENY	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammach@gmail.com
	S-ro Hervé KIEFFER	06.21.09.19.98	kiefferherve@gmail.com

Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Kjara en Wintzenheim	15. El nia libro-servo	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Printempa Semajno Internacia	16. Enigmaj + anekdotoj	
3. Printempa Semajno Internacia	17. Anekdotoj + Gresillon	
4. Printempa Semajno Internacia	18. Grandaj nombroj + kalkulado	
5. Printempa Semajno Internacia	19. Neŭŝatelo kaj duolingvo	
6. IFEF-kongreso en Malago	20. Kjara itala kantistino	
7. IFEF-kongreso en Malago	21. Koncerto de Kjara Wintzenheim	
8. IFEF-kongreso en Malago	22. Staĝo en Strasburgo	
9. Komitatanoj kaj enhavo	23. Staĝo en Strasburgo	
10. Angulo de la prezidanto	24. Staĝo en Strasburgo	
11. Avula angulo (sekvo)	25. Staĝo en Strasburgo	
12. Studentoj el Barato raportas	26. Hispana kongreso	
13. Studentoj el Barato raportas	27. Padovo + Konstruado-kajero	
14. Bavelo-seminario en Lörrach	28. Nia foto-paĝo en Koreio	

Karaj gesamideanoj,



La sukcesa bone vizitata koncerto de la itala kantistino Kjara en Wintzenheim (sidejo de TAKE) (kun multe pli da ne-esperantistoj ol da esperantistoj) kaj la sukcesa printempa renkontiĝo majstre organizita de niaj strasburgaj gesamideanoj min instigas reparoli pri la asociaj strukturoj de nia movado.

Min pesimismigas la malkresko de la membraro de niaj asocioj. Plej timiga estas la ŝrumpado de la membraro de UEA, kie oni nun antaŭvidas maldungon de dungitoj malgraŭ la farota laborego necesa por konigi nian lingvon. Pro tio mi petas vin ne forgesu, ke ĝis nun ni dankas la pluvivon de nia lingvo al la senavara kotizado kaj senpaga laboro de niaj membroj.

Eble vi havas respondon al la demando: kial la laŭdiraj centoj da miloj da gelernantoj de la retaj kursoj ne faras la sekvan paŝon al nia movado: la engaĝon por nia lingvo.

Ni jamaj aktivuloj rekompence ja nenion atendis de la movado krom la ebleco partopreni eventojn organizitajn de samaj aktivuloj tra la mondo.

Ĉu vi proponos vian respondon por niaj gelegantoj???

el

Steinerne Parolen
Albanische Erzählungen
Monda Asembleo Socia (MAS)


Dank'al mia amiko Bardhyl SELIMI, kiu loĝas en Tirana (Albanio) mi lernis multegon pri Albanio, kiun mi neniam povis viziti dum mia junaĝo. Tomasz Chmielik (Pollando) eldonis en 2012 la rakontaron *La sloganoj el ŝtonoj* de Ylliet Aliĉka. Dank'al la esperanta traduko de Bardhyl Selimi kaj Tomasz Chmielik, ambaŭ konataj en nia asocio, mi malkovris la vivon de la simplaj homoj dum la diktaturego de Enver Hoxha -pri kiu la okcidentaj amaskomunikiloj apenaŭ parolis- kaj post la liberiĝo de la lando.

La verko tiom plaĉis al mi, ke mi deziris ĝin konatigi al miaj germanlingvaj geamikoj. Mi ĝin do tradukis en 2014. Dume mi ankaŭ renkontiĝis en Strasburgo kun Ylliet Aliĉka, verkisto kaj eksa diplomato.

Fine troviĝis ankaŭ eldonisto, la famkonata esperantisto kaj prizorganto de la esperanta versio de *Le monde diplomatique*, loĝanta en Kubo: Wilhelmo Lutermano.

Se vi deziras donaci la libron al geamikoj komprenantaj la germanan, vi povas akiri la verkon ĉe: Monda Asembleo Socia (MAS) aŭ ĉe AMAZON.

Ankaŭ ekzistas franclingva eldono: *Les slogans de pierre Ylliet Aliĉka* (1999)



el

AVULA ANGULO

Armand HUBERT ... *aflugas rememoraĵoj*



PRAGEONKLOJ

sekvo de *La Informilo 185-Paĝo 13*

LA MILITBATO

En septembro 1939, la Dua Mondmilito krude fortranĉis la kamparan etoson stampitan per laborpeno kaj per sobraj kontentiĝoj.

Tiu milita okazaĵo rompita la glatan vivon de gesinjoroj Glad. Ili postlasis sian vilaĝon, kiel ĉiuj enloĝantoj, piede, rezignante pri siaj havaĵoj. Ne posedante kamparanan ĉareton, ili trovis lokon sur tiu de familiano por savi siajn magrajn havaĵojn. La blanka kaprino obeeme sekvis sian mastrinon per kol-brido, kiel dum ĉiutaga, nutro-dona promenado:

Ĝi tiam ne sciis, ke ĝi iris al sia perejo. La kaprino nombris inter la unuaj viktimoj.

Glad-Patt buĉis ĝin en korto dum la unua etapo kun tremanta mano kaj larmoj en la okuloj. Dume en gastiganta domo, oni aŭdis skuigan plorĝemon de onklino Marie.

Ilia ĝistiam viva-spaco senrimede fortranĉiĝis. Ilia mondo ruiniĝis per cinika milit-bato.

Eŭropo! EŬROPO!!

ANTAŬ OKDEK JAROJ

Minaco peziĝas, kvazaŭ fizike perceptebla de spektanto, kiam ĉe landlimo, li panorame observas ĝis-horizontan Germanion.

Mia onklo Viktor loĝas en landlima vilaĝo. Lia tritiko-kampo apudas similan, ĝemelan, germanan.

Estas la sama grundo: ĝi akceptas la samajn grenerojn, produktas la samajn rikoltojn, postulas la samajn prizorgojn duflanke de la demarkacia linio.

Nur streta vojo distenas la duopon: vojeto de doganistoj. Sed la kampo-posedantoj ne interparolas, eĉ kapturite evitas unu la alian. Hermann (tiu de la alia flanko) rifuzas ligan, kiu suspektigus perfidon. Viktor scias, ke konflikto proksimas, gvatas. Sento lin turmentas: "Baldaŭ mi tenos lin ĉe fuzil-celilo; oni postulos, ke mi paf-faligu lin!". Kolero kaj naŭzo invadas lian ventron.

La prilaboro de la kampo, kiu apudas la najbaran malamikan iĝas tute malĝojiga. Kiam Hermann kun ĉevaloj prizorgas sian flankon, Viktor prokrastas sian taskon, kun spito.

NUNTEMPE, post stariĝo de Eŭrop-unio.

La kampoj, samloke, etendiĝas flanke-ĉeflanke, paciencaj, promes-plenaj.

La nepo de Viktor, samkiel tiu de Hermann, daŭrigas la kamparan klopodon, sed la du nun alparoladas unu la alian. Kiam iliaj traktoroj kruciĝas, ili haltas spontane: la kondukistoj havas ion por interŝanĝi, ĉu parole, ĉu geste, ĉu ride. "Ĉu vi konstatis? Niaj filinetoj iĝis nedisigeblaj. Ili ĉiutage gajece kunvenas kaj la mia alparolas min france" En tiu ĉelime franca vilaĝo, la germanaj etuloj akceptiĝas en komuna infanet-lernejo. Jen infanoj de du borderoj kunlernas kaj kunludas iĝantaj samtempe dulingvaj. La gepatroj de du borderoj interkonatiĝas kaj kune samcele agas.

Nun sen lim-zonaĵo oni kun-apudas serenece.



1951. CECA-on starigis la iniciantaj ŝtatoj de Eŭrop-Unio: CECA, *Eŭropa Komunumo de Karbo kaj Ŝtalo*, iĝis la unua paŝo al politika Unio.

Kuzo Artur laboris en esplor-ofico De Wendel en Hayange (Francio, Loreno): kiel industria projekciisto, li prizorgis fer-alt-fornojn.

CECA altrudis sin en tiun ŝtal-produktan mondon, kiu vigle protektis siajn sekretojn de fer-produktado.

CECA: La estraro aprobis la eblecon de kunlaborado, sed pluraj projekciistoj antaŭ nelonge pafadis kontraŭ naziismo: ili streĉe malfavoris ĉian kunstaron kun eksaj malamikoj. Estiĝis vigla kontestado. Sed teknologio gajnis en la debato.

De Wendel, la elstara fer-industriisto, projektis konstruon de eksterordinara fer-altforno, la plej efika de la kontinento (500 000 tunoj da giso jare!) La giganta konstruaĵo nepriĝis la lutadon de ŝtal-toloj pli dikaj ol 50 mm. Je germana flanko, la milit-industrio atingis tiun teknikan akiron (per ilia muntado de tankoj kaj submarŝipoj). Tiel kunlaboro inter Hayange (franca elstarajo) kaj Völklingen (germana elstarajo) ebligis.

CECA: politike alta decido tiele detruis la volon krei armilojn kontraŭ la najbaron. la industria travidebleco okazis, kio estis decida paŝo al najbareca paco.

Okaze de la staĝo en Strasburgo estis ankaŭ invitaj gestudentoj el Barato.

Kiel krokodilantoj iĝas malkrokodilantoj: rakonto de kunveno.

Saismit Naik, Satavisha De, Shriya Hirve kaj Ishwari Mukalwar.

Ni estas studentoj de IISER, Puneo, apud Bombay en okcidenta Barato. Ni komencis lerni Esperanton lastan jaron kun nia instruistino Elise Haddad, kiu venis al Barato por unu jaro kiel instruistino pri la franca lingvo. Ni ĉiam havis intereson por novaj lingvoj kaj ties strukturoj. Do ĝi estis por ni bona ŝanco por lerni tiun lingvon kun logika strukturo. Kelkaj el ni ankoraŭ kurioziĝis pri la filozofio de lingvo facila por facile komuniki. En nia lando ne estas unu lingvo parolata de ĉiuj, do ni bone konas la problemojn devenantaj de ĝi. Ni havis lekcionojn de Esperanto semajnofine dum kvar monatoj ĝis la fino de la lernojar, kiam nia instruistino devis foriri de nia Universitato.

Post tio ni provis daŭrigi la lekcionojn: por tio ni kreis lernoklubon, kie ni provis instrui aliajn personojn, kiuj partoprenis. Ni ankoraŭ provis havi tempon por praktiki kaj plibonigi nian propran kapablon en Esperanto. Sed ni ne havis plu iun por korekti niajn erarojn, ni havis problemojn kaj malfacilis konversacii en la lingvo. Ni sekve sciis, ke se ni volas daŭrigi la klubon, kelkaj el ni bezonas pliboniĝi kiel esperantistoj, ĝis ili povos instrui la aliajn.

Do kiam ni aŭdis pri renkontiĝoj, ŝajnis al ni mirinda ŝanco por praktiki la lingvon. Ni serĉis kaj trovis la renkontiĝon en Strasburgo, en Francio, kie ni sciis, ke Elise povas helpi kun la organizado. Sed la pli granda problemo estis la financoj. Estus tro kosta afero por ni pagi la bileton de aviadilo. Do ni mem kaj nia instruistino Elise petis multajn organizojn, ĉu ili povas helpi nin financi parton de la vojaĝo. Tio estis longa kaj malfacila entrepreno kaj ni longe kredis, ke ni ne povos vojaĝi.

Sed finfine ni povis partopreni en la renkontiĝo kaj en kurso dum unu semajno en Parizo. Ni ricevis la informon nur kelkajn semajnojn antaŭ la vojaĝo. Ni tuj faris la demandon por la vizo. Ni ekscitiĝis dum la

tempo de nia ekzamenoj. La afero eblis, ĉar ni ricevis financon helpon de Esperanto-France-Est kaj ĉar la organizantoj de la renkontiĝo en Strasburgo ne nur senpagigis nian partoprenon en la kunveno, sed ankaŭ konsentis gastigi nin dum la kunveno: ni estas tre dankemaj al Bernard kaj Muriel Pidancier, Bruno Flochon, Marie-Claude Boreggio, Jeff Schelcher kaj Joël Fontaine. En Parizo ankaŭ nia instruistino kaj ŝiaj amikoj gastigis nin. Ŝi eĉ tre afable aranĝis kelkajn lecionojn kun sperta instruistino de esperanto: Michèle Abada Simon, kiu ankaŭ instruis senpage.

En Parizo ni unue ĉeestis kelkajn kursojn por plibonigi nian esperanton kaj "paroligi nin", kiel diris la instruistino. Michèle Abada-Simon estis tre bona kaj pacienca instruistino. Ŝi instruis nin per diversaj metodoj por kompreni kaj paroli Esperanton. Ni ankaŭ multe marŝadis en Parizo, ĉar tio estis nia unua vojaĝo al Parizo, al Francio, kaj eĉ al Eŭropo. Loĝante ĉe niaj gastoj ni ankaŭ ĝuis malkovri la kulturon kaj vivmanieron de la homoj. Estis tre interesa sperto por ni.

La 10-an de majo ni veturis per trajno al la belega urbo Strasburgo por la kunveno. Ni estis ekscititaj kaj iomete nervozaj. Nia gastiganto Bernard akceptis nin kun la granda flago de Esperanto. Ni ne havis iun ajn problemon por rekoni lin. Ekde kiam ni havis iomete da tempo antaŭ la komenco de la kunveno, li montris al ni la altegan kaj belegan katedralon de Strasburgo. De tie li montris al ni plurajn partojn de la urbo. Post tio ni renkontis multajn homojn el aliaj landoj en la kunveno. Ni ankaŭ konatiĝis kun geedzaj paroj, kies sola komuna lingvo estas Esperanto! La vespermanĝo estis tre afabla kaj ni lernis pri diversaj kulturoj de diversaj landoj. Tre lacaj, sed ankoraŭ vekaj ni vidis tre interesan filmon en Esperanto antaŭ ol iri al la hejmo de Bernard kaj Muriel por ripozi.

Dum la dua tago ni ĉeestis la unuan lecionon de progresiga kurso. Nia instruisto Fabien Tschudy ankaŭ estis tre bona kaj helpis nin klarigi multajn konceptojn. Ni iris al ekspozicio pri homaj rajtoj, kie ni lernis multe kaj ni mallonge promenis en apuda parko, kie ni vidis multajn cikoniojn en siaj nestoj. Antaŭ la vespermanĝo ni havis duan lecionon de la kurso, kie ni praktikis la paroladon de Esperanto per la



rolludoj. Poste nia instruistino kaj ni vizitis la Parlemejtojn de Eŭropa Unio. Dum ĉiuj tiuj ekskursoj ni lernis multe kaj plupraktikis la paroladon en Esperanto. Ni havis duoblan profiton! Post la vespermanĝo ni ĝuis la koncerton de Jonny M, kiu kantis en Esperanto. Ni ĝojas ke Esperanto ne nur estas komuna lingvo, sed ankaŭ kreas novan homan kulturon tra la mondo.

Ni komencis la lastan tagon kun Fabien: tio estis jam nia lasta leciono de la kunveno! La semajnfino pasis tiel rapide! Sed ankoraŭ ne tute finis. Post la tagmanĝo li ankaŭ gvidis nin tra la urbo kaj rakontis al ni ties riĉan historion, antaŭ ol li foriris trajne al Mulhouse kaj ni al Parizo. Do li akompanis nin ĝis la stacidomo.

Kontribuo de Élise:

Antaŭ ol renkonti miajn junajn baratajn esperantistojn, mi konfesas, ke mi lernis Esperanton nur en libro. Tiel ni lernis kune kun mia kunulo la bazojn de la esperanta lingvo. Se mi bone memoras, ni ankaŭ ĉeestis semajnfinan kurson dum unu tago kaj duono. Mi povis fari simplajn frazojn, mi komencis paroleti. Tiam, kiel multaj homoj, la amaso da aferoj farendaj en la vivo atingis nin. Esperanto restis forlasita. Kelkfoje mi provis legi artikolojn, revuojn, sed nur de tempo al tempo.

Fakte la studentoj de IISER Puneo rekondukis min al Esperanto. Dum franca kurso, dum unu el la multaj rolludoj por prezenti sin en la franca, ili starigis demandon pri lingvoj kaj aŭdis min respondi, ke mi parolas iom da Esperanto. Jes, jes. Kial ne?

Vi povas imagi, kia estis mia surprizo, ĉe la fino de la semestro, kiam studento aperis en mia oficejo por peti min komenci Esperantan klubon. Mi ne sciis, ĉu ni sentas nin kapablaj intrui esperanton. Sed ni devis akcepti. Ne ĉiutage grupo de promesplenaj kaj amindaj gejunuloj petas vin transdoni al ili ĉi tiun lingvon, kies mencio ofte provokas mokadon. Probable la defio de konstruita lingvo amuzis ilin. Mi ankaŭ supozas, ke en lando kiel Barato, kie la pragmata kaj etika problemo de la lingvo estas en la kerno de ĉiutagaj aferoj, estis nature ke la Esperanto-principo renkontas veran eĥon!

Ĉiokaze mi provis apliki al la esperantokursoj la metodojn, kiujn mi ankaŭ disvolvis en la didaktiko de la franca: kantojn, ludojn. . . mi malkovris por ili kaj kun ili la trezorojn de Jutubo kaj la kanton de la bovinoj. . . Mi pasigis tempon imagante, adaptante, tradukante, desegnante amuzajn ludojn, kiel eble plej efikajn. . . kaj estas multe pli malfacile, kiam oni ne

povas facile konduki la ludon – ĉar eĉ se mi progresis instruante al ili ĉiujn miajn sciojn, mi ankoraŭ ne estas vere sperta Esperantistino!

Mi fieras, ke ili persistis post mia foriro. Kaj mi volis kuraĝigi kaj rekompenci ilin ebligante ilian vojaĝon. La organizo kaj la serĉado de mono ne facilis. Mi eĉ devis antaŭdoni la monon de kelkaj aviadilaj biletoj kaj mi esperas reakiri ĝin organizante manĝadojn en asocieca restoracio en Parizo. (Vi ricevos la informojn, ne hezitu veni, ni bezonos gastojn!) Sed mi vere feliĉas trovi ion multe pli valoran en la Esperanto-komunumo ol mono: multajn homojn, kiuj helpas volontuli gastigante nin simplece oferante sian energion kiel instruistoj, ktp, en Parizo kiel en Strasburgo!

Fine, certe oni povas diri, ke mi sukcesis porti ilin al Parizo kaj Strasburgo, sed same veras, ke ili sukcesis konduki min al Strasburgo, kiu ankaŭ estis mia unua internacia renkontiĝo de Esperanto! Kaj finfine mi tre feliĉas, ke tiuj amikoj de malproksima parto de la mondo rekondukis min al la internacia lingvo. Per ilia kunestado la sperto pri Esperanto vere pli sencas!

Kontribuo de Sagnik:

En iu tago de novembro aŭ decembro 2017 mi iris al la oficejoj horoj de Elise Haddad, ĉar mi volis lerni Esperanton. Mi jam aŭdis en la lernejo, en la deknua klaso, pri tiu kreita lingvo kaj tio vekis mian scivolemon. Do mi demandis al Elise, ĉu ŝi povas instrui min.

Elise scivolis, ĉu aliaj personoj povus interesiĝi pri esperanto kaj proponis, ke oni organizu klubon. Do ni dissendis apertan proponon en la Universitato kaj multaj respondoj de interesiĝantoj venis.

Mi jam sciis, ke, jes, ekzistas aliaj interesiĝantoj, ĉar multaj studentoj de la franca kurso disvastigis la novaĵon de la instruistino, do ĉiuj scivolis kaj volis ĉeesti agadon gviditan de ŝi. Ankaŭ multaj personoj ŝatis la ideon, lerni facilan lingvon, kiun oni povas rapide paroli. Finfine multaj personoj fidis la propedeŭtikan valoron: tio helpus ilin lerni novajn Eŭropajn lingvojn.



Lasta saluto



41a BAVELO-Seminario - 86a regiona aŭtuna staĝo 18a - 20a de oktobro 2019 en Lörrach

Ne, la bildo **ne** estas el Lörrach, sed el Bazelo.

Ni gastigos en la junula-gastejo de Lörrach, kaj la sabata ekskurso gvidos nin al la apuda urbo Bazelo (vd la bildon, kvankam oktobre - ni ne baniĝos en Rejno, promesite !!!)

Krome estas multaj belaj kaj interesaj facetoj, kiuj valorigas vian partoprenon al la seminario.

En la bukeda kurso parolos Thomas Bormann pri sia tempo en Istanbul "Ŝanĝiĝo de malferma socio al aŭtoritate strita socio en Turkio". Kaj li tuŝas plian gravan temon: "kiel Stasi observis Esperantistojn en GDR (La danĝeraj lingvo-uzantoj en GDR)". Pliaj interesaj prelegantoj kaj temoj - inter alie pri vojaĝego per bicikla - atendos vin, detaloj sekvas baldaŭ per nia novaĵletero bavelo-aktuel.

Vespere vi povas ĝui kaj miri kaj elprovi viajn sciojn en kvizo pri la vasta bunta mondo de lingvoj kaj poste rnalstreĉiĝi dum babilado en la knajpo.

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Du noktoj en la junulargastejo, ĉiuj manĝoj (* sabate tagmeze proprakoste ekster la junulargastejo)

en 4-lita ĉambro 70 €

en 2-lita ĉambro 90 € (tre limigita kvanto)

Programskemo

vendredo, 18a oktobro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 - 20:00 kurso

ekde 20:15 vespera programo poste knajpo

sabato, 19a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

09:00 - 11:45 kursoj de ĉiuj niveloj

12:00 - 13:00 ekiro al tagmanĝo, poste daŭrigode la elsurso al Bazelo, urbogvidado

18:00 - 19:00 vespermanĝo

19:00 - 20:15 kurso

ekde 20:30 vespera programo poste knajpo

dimanĉo, 20a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

08:30 - 09:00 redono de ĉambroj

DJH Jugendherberge Lörrach

Steinenweg 40, DE-79540 Lörrach

{Koordinatoj: 47.5004859 N, 7.6782375 E}

Tel: +49 (0) 7621 47040

jugendherberge-loerrach.de

Kursoj:

- A** komencantoj (Gerold Busch)
- P** paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B** Bukedo kun diversaj prelego-"floroj" de pluraj prelegantoj (detaloj en la supra teksto)
- i** Infanprizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (Cornelia. Majer, Barbara Bertrand)

Aliĝilon bonvolu sendi al:

inge.simon@esperanto.de

aŭ poŝte al S-ino Inge SIMON, Brünner
Str. 20 DE-73431AALEN

Pagebla per ĝiro al

CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy
per franca ĉeko al Esperanto France-Est
sendata al André GROSSMANN

5, rue des Pyrénées,
68390 BALDERSHEIM

ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

Aliĝilo

(bv sendi al: Inge.simon@esperanto.de, 07361/ 360 615)

Mi ĝiras _____ eŭrojn al jena konto

- BAVELO-Konto:** IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 - BIC: SOLADES1VSS . (Sparkasse Schwarzwald-Baar)
- CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy**

Mi partoprenas la kurson A / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

- 2-lita ĉambro ve/sa sa/di
- 4-lita ĉambro ve/sa sa/di

Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

Manĝoj en la junulargastejo:

- Mi volas vegetarajn manĝojn
- Mi havas alergion kontraŭ _____

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso,

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago al unu el la du kontoj.



El nia libroservo

Informoj



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan semajnfino en Lörrach la 18/20ajn de oktobro 2019.

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est: esperanto.france.est.free.fr. Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin) !

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias


libroservo.efe@laposte.net



Nove alvenintaj libroj



①



②

- 1) **FOR LABATALILOJN!** Romano, Bertha Von Suttner Bertha, *Kava Pech*, 2019, 472 p. 39 €. Kontraŭmilita romano verkita de la nobelpremiito pri paco Bertha von Suttner, tradukita en multajn lingvojn, estas konsiderata Biblio de la paco ne nur flanke de pacistoj, sed de ĉiuj pacamaj homoj. Malgraŭ tio, ke ĝi estas verkita fine de la 19a jarcento, ĝi perdis nenion el sia aktualeco.
- 2) **LARNE LA ĈEFIDO**, Rakonto, Leif Nordenstern, *Kava Pech*, 2019, 120p, 15 €. Aventura historia rakonto. En la jaro 829 vivas Arne kun siaj amikoj en sveda vilaĝo. Lia avo estas vikingo. En la vilaĝo aperas du fremduloj, kiuj rakontas pri nova dio. Kiuj estas la viroj en la vikinga ŝipo, kiuj igas vilaĝanojn fuĝi el sia vilaĝo? Ĉu povas libera homo kaj sklavo ligi amikecon? La respondon vi trovos en ĉi tiu agrabla libro facile legebla, kiu taŭgas por junaj legantoj, sed ankaŭ por ĉiu-aĝuloj. **Nova eldono kun koloraj ilustraĵoj!**


Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54.
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est"

IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>	Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino	
En	Subskribo:

Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj



HORIZONTALA:

- Fama esperanta revu' (2 vortoj)
- INVERSE: substanc', kiu adheras. Rare sen vokaloj. Mezur' de surfaco.
- Apertur' en subtera ĉambro.
- Landkodo de Senegalo. Nordafrika land'.
- Situacio. Prepozicio.
- INV: adverbo. Veneno.
- Turnostang'. Objekt', kiun iu ricevas kiam tiu gajnas.
- Femala rabobest'. Malgranda.
- Plektaĵ'. Ec' de tio, kio estas tute simila.
- Famobril'. Indiano.

VERTIKALE:

- Europa land'.
- Kudrileg'. Liero tute miksita.
- Eskima dom'. Posttagmanĝa dormo.
- Embri'. Pronomo.
- Mara bird'. Partikulo.
- Birdoscienc'.
- Historia periodo. Grup'.
- Trab' en ŝipo. Astro.
- Koro de mirto. Konjunkcio. Paperuj'.
- Gracie. Peniso.:

GJ

En la sama kupeo kune vojaĝas graveda virino kaj ventroparolanto. Ŝi trankvile legas gazeton, kiam subite aŭdiĝas beba voĉo:

"Panjo!" La virino ĉirkaŭ-rigardas kaj vidas nenium.

"Panjo! "

"Ĉu vi aŭdis?" demandas la virino. .

"Jes, ŝajne eta voĉo" respondis la viro.

"Panjo!". .

-Sed, ĉu estas vi, mia bebo?

-Jes, estas mi, kara panjo!

-Sinjoro, jen eksterordinara evento, mia bebo en mia ventro jam alparolas min!

-Mirinde, jes. . . Tion mi neniam spertis" respondas la viro. .

"Etulo mia, ĉu vi bone fartas?"

-Jes, panjo, tre bone!

-Ĉu vi deziras ion?

-Jes, panjo, mi deziras saluti per kiso la sinjoron..."

En granda firmao, juna dinamika oficisto finis sian laboron kaj pretas hejmeniri. Tiam li renkontas la novan Ĝeneralan Prezidanton, ĵus elektitan de la akciuloj. Li staras antaŭ la aŭtomata paper-detruilo, kun dokumenton en la mano.

"Nu, juna kunlaboranto, vi certe kapablas funkciigi tiun maŝinon, bonvolu helpi min, mia sekretariino ĵus foriris.

- Tutcerte sinjoro!

Li konektas la kablون, ŝovas la folion en la supran fendon, tiam aŭdiĝas la bruo de la displitiĝo..

"Dankon! Vi povas foriri... Unu kopio sufiĉas!..."

Direktoro de cirko aperigis anonceton por dungi homon. Senlaborulo sin prezentas ĉe la direktoro, kiu klarigas al li la laboron:

"Komprene, ni elspezis grandan monsumon por reklami kaj emfazi pri nia simio el Papuazio, unika specimeno... Bedaŭrinde ĝi ne eltenis la lacigan vojaĝon... Ĉu vi konsentus anstataŭi ĝin?"

La senlaborulo konsentas, ĉar la salajto estas relative alloga. Tiel ĉiu-matene li surmetas sian simio-kostumon, alkroĉas sin al la stangoj de la kaĝo, lerte balanciĝas kaj sukcesas eĉ engluti sinsekve kaj senprobleme kvin aŭ ses bananojn..

Iun tagon pro missalto, li falis en la najbaran kaĝon, kie minace muĝis tigro. Terurigite, li preskaŭ svenas, kaj vane provas eskapi kriante: "Helpon, helpon! Mi estas homo!..."

Tiam, je tiuj vortoj la tigro kviete alproksimiĝas kaj flustras:

"Ne krii tiom laŭte!... Se ne, ni ambaŭ estos maldungitaj!..."

SOLVO KVE 185:

HORIZONTALA: 1.KAMEL. MINI. 2.REAKIRI. EK. 3. ORGIO. LAGO. 4.KON. NEI. IN. 5.OLEM. STO. 6. DIZERTINT. 7.ITINER. KAJ. 8.SO. EL. 9.KIO. ITIOK. 10. KONGOLANDO.

VERTIKALE: 1.KROKODIL. 2.AEROLIT. KO. 3. MAGNEZI. IN. 4.EKI. MENSOG. 5. LION. REO. 6.ESTR. IL. 7. MILITI. ETA. 8.ONKLIN. 9.NEGI. TA. OD. 10. IKONO. JAKO.

Jen la unua tago de la lerneja tempo.
 La geknaboj atendas antaŭ la pordo, tiam venas la direktoro. Li alparolas novulon:
"Kiel vi nomiĝas, etulo?"
-Olivero, sinjoro Direktoro.
-Eksciu, ke en ĉi-tiu lernejo oni uzas nur la familian nomon.. Kiu ĝi estas?"
-Randriamanalina, sinjoro Direktoro..
-Bone, Olivero, vi rajtas eniri:"

Okaze de vespera festo, en kiu ĉiuj partotrenantoj devis esti originale vestita. La premiita estis vestita kiel la imperiestro Nerono. Sed li devis rezigni pri sia premio en la unua vico. La juĝantaro ja rimarkis poste, ke li surhavis kalsoneton kun la marko "kanguruo"
Nu, mi tamen ne komprenas! Kial?"
-.. Sed la romianoj tute ne konis la ekziston de Aŭstralio!"

Somera Programo en la Kastelo Grésillon

8a ĝis 18a de julio

- **Dennis Keefe** (Usono, Hispanujo) : Nova kurso pri Unesko-Kuriero
- **Marion Quenut** (Tuluzo) : Esperanto-kurso por komencintoj kaj progresantoj
- Interŝanĝoj de scioj kaj faroj *en la franca lingvo*
- Caroline Mauboussin: Libro-bindado
- <http://gresillon.org/s2>

6a ĝis 16a de julio

- **Dennis Keefe** (Usono, Hispanujo) : Kurso pri la filmoj de Ĉarli Ĉaplin

Estro de firmao informas sian edzinon dum la tagmanĝo, ke vizitis lin sindikata delegito.
"Imagu, la grupo postulas malatigon de salajro!"
-Nu? Nekredebla afero, ĉu ne? Ĉefe nuntempe, kiam preskaŭ ĉiuj firmaoj spertas la malon! Supozeble vi ja kontentas pri tio!"
-Kontentas mi? Ne imagu! Ja temas pri malaltigo de mia propra salajro!"

Turisto vizitas Skotlandon. Tie li deziras nepre vidi la monstron de Loknes.
 En proksima trinkejo li informiĝas kaj demandas la kelneron.
"Kiam plej oportunas vidi la monstron?"
 La kelnero respondas: *"Tre verŝajne post la kvina..."*
-Ĉu vere post la kvina horo??"
-Ne ne, post la kvina viskio.."

- **Jean-Luc Kristos**: Ludu ni por paroli iomete, multe, pasie!
- Alain Delmotte: Sorobano, japana abako, magia kalkulilo en via kapo
- Nicky Janssen: Mazi en Gondolando, kurso per desegnofilmo por infanetoj
- <http://gresillon.org/s4>

B O N V E N O N !
 Maison Culturelle de l'Espéranto Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
 Telefono: 02. 41. 89. 10. 34 (respondilo)
 Retpoŝto: kastelo@gresillon.org

Ĉu vi jam vidis krokodilon violoni?

Kiajn feriojn VI deziras?

- ĉu agrablajn?
- ĉu amikajn?
- ĉu instruajn?
- ĉu komfortajn?
- ĉu naturajn?
- ĉu artajn?
- ĉu ripozajn?
- ĉu aktivajn?



Haltu minuton kaj pripensu:

- imagu belan 5-kordan violonon en la subluma halo de la kastelo!
- imagu koncerton kaj dancon sur la nobela ligna planko!
- imagu muzikan aperitivon en la kastela parko per irlandaj keltaj melodioj!
- imagu amikan kantadon de francaj konataj kanzonoj kun violona akompanado!
- imagu rondan kaj paran popoldancadon por senstreĉe ekzerci vian korpon en ritmo!
- imagu amuzan spektaklon de klaŭno kun violonista manpupo!

- imagu senpagajn inicajn kursojn de violono kun malgrandaj violonoj por infanoj sed ankaŭ por vi!

**Kaj ĉio tio en Esperanto!
 Por plibonigi vian paroladon kaj vian komprenon.
 Ĉu vi jam vidis krokodilon violoni?**

Mi estas francino naskiĝinta en Parizo SED mi ne havas francan akĉenton kaj mi promesas korekti viajn francismojn.
 Pliajn informojn ne hezitu peti de Fransoazo (Françoise Noireau) telefono: +336 09 12 03 74 aŭ retmesaĝe: fransoazo@gmail.com
 Tiu anonco invitas vin al dektaga restado en la kastelo Greziljono inter la 6a kaj la 16a de aŭgusto.
 Vidu detalojn en la retejo: <http://gresillon.org/s4>

<https://violonodelamondo.wordpress.com/>
Françoise NOIREAU
+33 (0)6 09 12 03 74
+33 (0)2 98 09 42 72

Ni lernu pri grandegaj nombroj kaj pri menskakulado

Nomoj de grandaj nombroj Malnova sistemo evitenda		
Nombro-vorto	Eŭropo	Usono
miliono	1.000.000	1.000.000
biliono	1.000.000.000.000	1.000.000.000
triliono	1.000.000.000.000.000.000	1.000.000.000.000
kvadriliono	1.000.000.000.000.000.000.000.000	1.000.000.000.000.000

- ◆ La sama vorto por malsamaj nombroj
- ◆ En Eŭropo ankaŭ ekzistas vortoj por 1000 milionoj = miliardo, 1000 biliono = 1 biliardo, 1000 triliono = triliardoj, ktp
- ◆ La nombrovortoj baziĝas sur la latina vortoj por du, tri, kvar, ktp

Nomoj de grandaj nombroj Nova sistemo		
Nombro-vorto		
miliono (unuiliono)	1.000.000	$10^6 = 1.000.000^1$
duiliono	1.000.000.000.000	$10^{12} = 1.000.000^2$
triiliono	1.000.000.000.000.000.000	$10^{18} = 1.000.000^3$
kvariliono	1.000.000.000.000.000.000.000.000	$10^{24} = 1.000.000^4$
dekiliono	1 kun 60 nuloj	$10^{60} = 1.000.000^{10}$

- ◆ Ekster la sistemo ankaŭ ekzistas plia nombrovorto: Guglo = 10^{100}
- ◆ Vorto inventita de 9-jara Milton Sirotta, nevo de matematikisto Edward Kasner
- ◆ La firmao Google uzis tiun nombrovorton kiel nomon.
- ◆ La nombro de atomoj en la observebla universo estas taksata mapli ol Guglo!

Kiel mense kalkuli la Semajntagon de iu ajn dato?

Por kalkuli semajntagojn, unue vi lernu malgrandan poemon:

Nul, tri, tri – memoras mi,
Ses, unu, kvar – jam la duonjar'.
Ses, du, kvin – ne ĝenas min,
Nul, tri, kvin – jen la fin'!

Per tiu poemo vi jam parkerigis tiujn nombrojn:

januaro, februaro, marto 033
aprilo, majo, junio 614
julio, aŭgusto, septembro 625
oktobro, novembro, decembro 035

Ĉiu monato rilatas al cifero, ekz. junio rilatas al 4

Kiu semajntago estis la 30a de aŭgusto 1952?

- 1a Uzu nur la lastajn ciferojn de la jaro: 52
- 2a Dividu la jaron per 4 (sen resto) kaj adiciu al la jaro: $52:4=13$, $52+13=65$
- 3a Se la jaro estas 2000 aŭ poste, subtrahu 1: Ne estas, 65
- 4a Adiciu la ciferon kiu rilatas al la monato laŭ la tabelo: Aŭgusto=2, $65+2=67$
- 5a Adiciu la tagon: $67+30=97$
- 6a Se la dato estas en januaro aŭ februaro de superjaro, subtrahu 1: Ne estas, 97
- 7a Kalkulu la reston de la divido de tiu rezulto per 7: $97:7=13$ resto 6
- 8a 6 signifas la sesan tagon de la semajno, do sabaton

Kiu semajntago estas la 13a de aŭgusto 2015?

- 1a Uzu nur la lastajn ciferojn de la jaro: 15
- 2a Dividu la jaron per 4 (sen resto) kaj adiciu al la jaro: $15:4=3$, $15+3=18$
- 3a Se la jaro estas 2000 aŭ poste, subtrahu 1: Estas, $18-1=17$
- 4a Adiciu la ciferon kiu rilatas al la monato laŭ la tabelo: Aŭgusto = 2, $17+2=19$
- 5a Adiciu la tagon: $19+13=32$
- 6a Se la dato estas en januaro aŭ februaro de superjaro, subtrahu 1: Ne estas, 32
- 7a Kalkulu la reston de la divido de tiu rezulto per 7: $32:7=4$ resto 4
- 8a 4 signifas la kvaran tagon de la semajno, do jaŭdon


Oni atentu, ke la jaroj, kiuj estas divideblaj per 4 estas superjaroj, krom la jaroj, kiuj estas divideblaj per 100, kiuj ne estas superjaroj, krom la jaroj, kiuj estas divideblaj per 400, kiuj ja estas superjaroj.

Ekzemploj:

- 1967 ne estas dividebla per 4, do ne estas superjaro.
- 1980 estas dividebla per 4, tamen ne dividebla per 100, do estas superjaro.
- 1900 estas dividebla per 4, sed ankaŭ dividebla per 100, sed ne per 400, do ne estas superjaro.
- 2000 estas dividebla per 4, per 100, kaj per 400, do estas superjaro

Celebrado de la lingvo-multeco-Statuo en Neŭŝatelo, Svislando

Du eventoj okazis en Neŭŝatelo la 22-an de septembro 2018: 20-jariĝo de la Botanika Ĝardeno kaj 10-jariĝo de la asocio nomata "La Lundoj de la Vortoj", kiu regule kunvenas por aŭskulti prezentojn pri lingvoj kaj komunikado. La artisto Ruben Pensa ricevis la taskon koncepti ion en tri dimensioj por tiu evento. Li imagis Babel-turon en atleco de 7 metroj ornamitan per la frazo de la itala poeto Erri de Luca: "Sxajnas al mi, ke per la multobligo de la lingvoj la horizontoj multobliĝas." La artisto esprimis la deziron, ke tiu frazo aperu en plej diversaj lingvoj sur metala rubando ĉirkaŭ la lignaj pilieroj, kiuj formas la turon. Jen pri la ideo.



Kiel konkretigi la projekton? La membroj de la asocio kolektis la frazon en deko da lingvoj per diversaj rimedoj pli aŭ malpli efikaj kaj ankaŭ tradukis ĝin al Esperanto. Ili kontaktis min, por ke mi kontrolu tiun tradukon. Tion mi faris. Sed mi plie faris jenan proponon: mi povus provi uzi la kutimajn informkanalojn de la Esperanto-movado por kolekti pli da tradukoj. Ili reagis tre pozitive. Fine de marto 2018 mi lanĉis alvokon per la kanaloj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI. Alvenis iom post iom la tradukoj, kelkaj aperis en tre estetikaj alfabetoj. Ene de monato ni akiris 50 tekstojn. Mi kontrolis, ke ni havu la kvar svisajn lingvojn kaj la ses laborlingvojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO. Farita. La skulptaĵo staris dum monato centre de la urbo Neŭŝatelo. Poste ĝi staros en la Botanika Ĝardeno en la supera parto de la urbo, en verda kaj trankvila valo nomita Vallon de l'Hermitage.

Mireille Grosjean
Présidantino de ILEI



Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA

Al Esperanto-Grupoj kaj Esperanto-instruantoj

Esperanto estas sukceso ĉe Duolingo!

Nuntempe 780 mil homoj aktive lernas Esperanton per Duolingo, sed ekzistas potencialo por multaj aliaj, ĉar Duolingo estas la plej granda virtuala lingvo-instruilo en la mondo, kun 300 milionoj da lernantoj.

UEA iĝis partnero de Duolingo por enkonduki lernantojn de Duolingo al la loka movado. Ĉiu esperantisto povas iĝi Duolingo-ambasadoro kaj krei eventojn en tiu platformo. Kiam lernanto de via regiono atingas la finon de leciono, tiu vidos Duolingo-reklamon invitante al via evento.

Se via grupo jam estas en Duolingo, bonvolu indiki al ni ĝian adreson. dankon

Rodrigo Tavares - kunordiganto de UEA pri esperantaj eventoj en Duolingo
Emilio Cid - Estrarano de UEA pri informado

Lernu kiel partopreni:

<http://www.gazetaro.org/duolingo>



En DNA aperis jena artikolo pri la koncerto de Kjara en Wintzenheim

DNA 4.6.2019

WINTZENHEIM Avec l'association Take Espéranto

De la chanson italienne à l'Arthuss

Jeudi 6 juin à 20 h à l'Arthuss aura lieu le concert de la chanteuse italienne Chiara Raggi, organisé par l'association Take Espéranto de Wintzenheim.

ORIGINAIRE DE RIMINI, Chiara Raggi est une auteure-compositrice-interprète et guitariste italienne. Elle vit actuellement à Turin.

Diplôme de guitariste à 20 ans

en poche, elle continue ses études au conservatoire de Turin « Giuseppe Verdi » puis au CET (Centre Européen de Toscolano) dont elle ressort diplômée (Auteur de texte).

Finaliste au Prix National Bianca d'Aponte en 2018, consacré à la chanson d'auteur, elle a remporté le prix « Sons d'Italie », qui lui a été attribué par Mariella Nava, qui lui a proposé de faire partie de son label « Sons d'Italie »

Elle a sorti trois albums et un single : *Molo 22* (2009) - *Disordine* (2015) enregistré à Manhattan avec le pianiste Aaron Goldberg, le batteur Lawrence Lathers, lors de son séjour à New York - *Lacrimometro* (2017) et *Blua Horizonte* (2019). Elle est également animatrice de télévision pour la chaîne ICARO TV.

Chiara chantant également dans la langue internationale équitable espéranto (la plus fa-

cile des langues, parlé par 2 millions de personnes), l'association Take Espéranto de Wintzenheim a donc été contactée par l'association de Turin, en vue de son déplacement à Belfort le 7 juin... et ainsi organisé un concert à Wintzenheim, le 6 juin à 20 h à l'Arthuss.

Le concert sera en italien avec deux ou trois chansons en espéranto. ■

► Entrée libre, plateau.

Kjara (Chiara Raggi) estas itala kantverkisto, aŭtoro, gitaristo kaj komponisto.

Finalisto de la **Nacia Bianca D'Aponte Premio 2018** dediĉita al la aŭtoro kanzono, ŝi gajnis la "Suoni dall'Italia" Premion aljuĝita al ŝi de **Mariella Nava** kiu proponis al ŝi fariĝi parto de ŝia diskeldonejo "**Suoni dall'Italia**".

Ŝi diplomiĝis je sia dudek-jariĝo en Klasika Gitaro ĉe la **Instituto pri Muziksuperaj Studoj "Giovanni Lettimi"** de Rimini, ŝi sekvis la Duan nivelon de la Eksperimenta Jarĉuo (TESPI), en muzika dirigentado kaj sceneja arto, ĉe la **Konservatorio de Torino "Giuseppe Verdi"** kaj diplomiĝis kiel "Aŭtoro de Tekstoj" ĉe la **CET (Eŭropa Centro de Toscolano)**, fondita kaj direktita de Mogol en 2009.

Je ŝia kredito, ŝi havas tri albumojn en la itala: **Molo 22** (2009), **Disordine** (2015), **Lacrimometro** (2017).

Ekde la 2-a de majo 2018 ŝi estas la aŭtorino kaj prezentisto de la semajna rubriko **Kantaŭtorino [ina]: Mi kantas kaj diras aferojn** merkrede matene je la 10a en **Icaro TV**.

En marto de 2018, kune kun la gitaristinoj Paola Selva kaj Fabiana Ferrandino, ŝi donas vivon al la rubriko dediĉita al la ina gitaro **GUITAR LADIES**, ĉiumonata intermetaĵo de la magazino **CHITARRA ACUSTICA** en kiu ŝi skribas, kaj parolas pri gitaroj kaj gitaristinoj.

De januaro 2017 Kjara eniras la "muzikan familion" de **Aramini Strumenti Musicali** (Bo) kiel subtenanto por la markoj **Effedot Guitars** kaj **Leho Ukuleles**.

En 2019 Kjara eldonas sian unuan albumon en Esperanto, **Blua horizonto**, kunlabore kun la **FEI-Itala Esperanto-Federacio** kaj **Vinilkosmo**. Ŝi fasciniĝis pro muzikeco de la lingvo kaj kion ĝi reprezentas por ŝi: ideo de egaleco kaj forta kaj unika esprimplena libereco.

Blua horizonto estas albumo verkita kun piedoj en la akvo, proksime al la maro, grava elemento en la **Kjara**-poetiko kune kun la temo de vojaĝado, serĉante belecon ene kaj ekstere de ni.

Ĉi tiu albumo estas vojaĝo al homa ekzisto, kaj rakontas travivaĵojn kaj sentojn kiuj loĝas en la koro de la homo.

Ĉiuj kantoj estis tradukitaj/adaptitaj de **Renato Corsetti** kaj **Gianfranco Molle**.

KJARA BLUA HORIZONTO

La disko estas akireble ĉe **Vinilkosmo**

Por la abonantoj:

Karaj abonantoj de la **ABONKLUBO** de Vinilkosmo, la nova albumo de **Kjara** ĵus aperis kaj aŭskultebblas sen lime alklakante rekte ĉe:

<https://music.divercities.eu/albums/402807>



Sukcesa koncerto de Kjara en Wintzenheim

Komence de majo, nia asocio estis informita, ke itala kantistino Kjara koncertos en Belfort por itala komunumo. Krome ŝi ankaŭ kantas en Esperanto kaj ĵus eldonis novan diskon kun la titolo "Blua Horizonto". Estis ebleco inviti ŝin por koncerti en la regiono de Mulhouse aŭ de Colmar. Positive reagis al tiu propono Michel Basso.



Interpretis al la franca Michel Basso.

En rekorda tempo Michel Basso, la dinamika prezidanto de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) sukcesis plenumi koncertsalonon en la sideja urbeto de TAKE, la vinprodukta alzaca vilaĝo Wintzenheim. Ekde la scio de ebla veno de la kantistino/komponistino Chiara (Kjara) Raggi pasis du semajnoj kaj la koncerto estis pretpreta. Post efika reklamkampanjo gazetara kaj afiŝa sepdeko da personoj plenumis la modernegan spektaklejon, inter ili ankaŭ esperantistoj. La tutan spektaklon Kjara prezentis mem.



La itala kantistino/komponistino Kjara koncertis en Wintzenheim (Alzaco)



Sola sur la scenejo, la juna artistino sin mem akompanis per gitaro. Alternis kanzonoj iom ĵazecaj, kiujn ŝi mem komponis, kanzonoj de Lucio DALLA kaj Fabrizio De André, kaj du kanzonoj en Esperanto de la lasta KD "BLUA HORIZONTO". Sursceneje, kiel sperta artistino, ŝi majstre regis la koncerton, kiu daŭris unu horon kaj duonon.



Mirigis la voĉo, kiu ravis la publikon, Ŝi foje ankaŭ kantis tute kompreneble sen mikrofono, kvazaŭ klasika kantistino, per klara belsona voĉo. Kiu aktuala varietea kantisto kapablas tion? Granda artistino ŝi jam estas!

Fine de la spektaklo Michel Basso kaj Sinjoro Nicole, la urbestro de Wintzenheim, donacis al ŝi korbeton kun alzacaj frandaĵoj kaj kartonon da alzaca vino kun Esperanto-etikedoj.



En la enirhalo atendis granda tablo kun glasoj da itala vino kaj alzaca kugelhof. Kjara tie proponis siajn KD-ojn en la itala: Molo 22, Disordine, Lacrimometro kaj la KD en Esperanto BLUA HORIZONTO al la ravita publiko, kiu restis por babili kun la artistino.

Por Kjara, ŝiaj geakompanantoj kaj kelkaj esperantistoj, Michel Basso rezervis tablon en restoracio Les Planches, kie la gaja babilantaro kunmanĝis ĝis noktomezo.



Printempa Esperanto Renkontiĝo en Strasburgo

10^a-12^a de
majo 2019

85a Regiona Staĝo de Esperanto en Rejna valo
organizita de Esperanto-Strasburgo



Tre sukcesa semajnfina renkontiĝo kun pli ol 85 partoprenantoj. La grupo de Strasburgo iniciatis interesan kaj allogan programon, kun pluraj vizitoj al la urbo, al la parlamentejo, al vingustumado. Estis proponita por limigita nombro, eĉ bicikla promenado en la urbo.

Okazis kursoj por komencantoj kaj por progresantoj. Tri prelegantoj intervenis por la literatura angulo.

Por la distra vespera programo eblis ĝui la koruson de Franjo Lévèque kun pluraj lokaj korusanoj. Jonny M. vigle koncertis sur la scenejo. Tre agraba repertuaro kun bone kompreneblaj paroloj. Sekvis prezentado pri Kartvelio.

La kulturcentro Saint Bernard plene taŭgis por tiu renkontiĝo, kun komfortaj ĉambroj kaj agraba restoracio.

Andreo

La renkontiĝo okazis en agrabla loko kaj ni estis tre afable akceptitaj.

La konstruaĵoj estas ĉirkaŭitaj de granda parko, kie ni vidis bestojn eble damainojn aŭ kapreolinojn.

Kaŝitaj statuoj vekis nian scivolemon: sankta Johano, sankta Marko kaj anĝeloj. Apogitaj ĉe la ĉirkaŭata muro, sub grandaj arboj, ili ŝajnas forgesitaj de la homoj...

Sabate, posttagmeze, ni vizitis Strasburgon piede. Cyril gvidis nin tra la renesanca urbo. Li klarigis ke laŭ la epoko, la nomoj de la stratoj ŝanĝiĝis. En 1871, Francio cedis al la germana imperio Strasburgon, kiu iĝis ĉefurbo de la regiono "Elsass Lothringen". La nombro de la loĝantoj kreskis kaj nova kvartalo estis kreita. Multaj imponaj domoj kaj hoteloj el diversaj stiloj estis konstruitaj laŭ la rivero Ill. Poste de nove, Strasburgo estis franca en 1918. Kaj dum la 2a mondmilito reĝis germana.

Ni migris laŭ la kajoj, kiuj nun estas rezervitaj al la pied-irantoj kaj aliaj diversaj radveturiletoj. Oni povas ripozi, sunbruniĝi en dediĉitaj spacoj, trinki bieron, kafon...Sed dum nia vizito ...PLUVEGIS!

Cyril montris al ni domojn kies superaj etaĝoj elstaras el la grund-etaĝo. Li klarigis ke, antaŭe oni pagis impostojn laŭ la surfaco sur la grundo. Tiel, oni pagis malpli.

Ni daŭrigis nian migradon irante sur la placon de la katedralo. Ĝi estis konstruata ek de 1015 ĝis 1439.

Majesta kun nur unu turo, ĝis estas tre alta por tiu epoko.

Cyril parolis pri famaj homoj de Strasburgo: Gutenberg kaj poste Kleber sed la tre malbonaj kondiĉoj (pluvego, ventego) devigis nin ĉesigi la promenadon.

Ni rehemigiĝis trame, ĉi foje ĉiuj samtempe, neniu malfruanto!






Sabate matene ni veturis al la urbo por viziti vin-butikon. Tie ni povis gustumi 3 diversajn vinojn, kiujn proponis la gvidanto. Ni ricevis ege multe da klarigoj.

Ni eksciis, ke Pinot Noir ja estas ruĝa vino, kiujn oni prefere trinku laŭ ĉambra temperaturo. Ne ĉiuj konsentis pri tio, kio kaŭzis interesajn diskutojn.



En la posttagmezo okazis intera literaturo-prezentado fare de 3 prelegantoj, nome Bernard Behra pri legitaj libroj, Jean-Luc Thibias pri novaj libroj en la Libro-servo kaj Istvan Ertl pri freŝe verkitaj aŭ tradukitaj libroj.



La kulmino de la aranĝo ja estis la sabata distra vespero kun kvazaŭ du konkurencaj muzikaĵoj.



Unue plezurigis la publikon la internacia koruso lerte gvidata de Fanjo Lévèque, kun pluraj lokaj kantistoj. Ili agrable interpretis la faman kanton de Pablo Neruda, "KANTO ĜENERALA" kaj multajn aliajn de la repertuaro. Ili ricevis varman aplaŭdon.

Kun alia stilo venis al la scenejo Jonny M. el Germanio.

Li vigle moviĝis sur la scenejo, sed liaj kantoj en Esperanto estas klare kompreneblaj. Lia stilo certe plaĉis al multaj ĉeestantoj, kiuj petis per viglaj aplaŭdoj duan rekantaĵon.

La vespero finiĝis en aliaj salonoj, ĉe la knajpo kaj ĉe vigligaj kaj amuzaj tablo-ludoj.



Prelegis Manfred pri plastaĵoj en la akvoj

Estis prezentitaj fulm-prezentadoj. Jen tiu de Manfred Westermayer (Esperanto Friburgo).

Jam en la 80-aj jaroj oni raportis, ke tutmonde pli kaj pli da plasto-rubo kuŝas en la naturo kiel en lagoj kaj maroj. Tio estas tutmonda problemo, same kiel la influo de homoj al la tutmonda klimato: eligo de forcejaj gasoj - plialtigo de temperaturo - sekve akriĝo de klimataj okazaĵoj: uraganoj, inundoj kaj tro-sekecoj. Krome akvo-vaporo transportas kemiaĵojn, similas la distiladon de viskio.

Sur la tero forŝetitaj plastaĵoj estas manĝataj de bestoj, kiuj ne povas digesti ilin.

En la maro estas eĉ pli granda problemo. Diversaj plastaĵoj amasiĝas en 4 aŭ 6 gigantaj kirlejoj, ĉar ili plejparte restas flosantaj surface; sed ankaŭ sur la marfundo troviĝas plastaj ruboj. Birdoj kaptas teĝoletojn - kiuj plenigas iliajn stomaketojn, kio kaŭzas tro-fruan morton. Testudoj manĝas la plastajn saketojn, kiuj aspektas kiel meduzo. Fokoj kun plastaj ŝnuroj, balenoj kun plenŝtopita stomako estas minacataj.

Pro la daŭra movigo kaj frotado ili kribriĝas, kaj estiĝas polvoj. Tion manĝas etaj organismoj filtrante la akvon. Ili siaflanke estas nutraĵo de pli grandaj organismoj, ĉi-tiuj de fiŝoj, konkoj, kraboj, ĉi-tiuj de homoj, ursoj, birdoj. Gravas, ke tiu rubo ne estas inertaj pecetoj, ĉar ili kutime adicie enhavas kemiaĵojn; eĉ povas adsorbi ilin el la akvo. Pro tio ili transportas kemiajn kromefikojn al la manĝantoj.

Nur en la lastaj jaroj oni komencis eviti tian tutmondan rubigadon. Kolekti kaj recikligi aŭ bruligi (ofte sub maltaŭgaj kondiĉoj).

Plej novaj estis re-kolektado en la riveroj aŭ maroj, kun helpo de fiŝistoj.

Fakte jam dum la normala uzado de tiaj plastaĵoj la homoj kaj similaj bestoj alprenas hormon-similajn substancojn (kseno-hormonojn), kiujn oni aplikis en aŭ al la plastaĵoj: moligenzoj, flamiĝ-reduktenzoj, akvo-forpelenzoj.

Jen kelkaj ret-ligoj: (en Esperanto) verduloj.org

-enz- estas nova afikso kiu montras kvazaŭ ilon, sed ne por meti en la manon, sed por apliki je kemia reakcio.

Elise Haddad instruis la francan lingvon en Barato en 2017-2018. Tie ekfunkciis Esperanto-klubo, kiu daŭre aktivas.

Poste reveninte al Francio ŝi proponis organizi vojaĝon por 5 el tiuj studentoj, kiuj deziris partopreni Esperanto-aranĝojn.

La staĝo en Strasburgo estis ankaŭ ilia celo. Tie ili povis partopreni la kurson por progresantoj de Fabien Tschudy.

Dimanĉe matene estis proponita bicikla ekskurso al Strasburgo. Pluraj biciklo estis metitaj je dispono, sed eble ne sufiĉe, tial Manfred skribas jene:



Mi ne partoprenis la bicikladon. Unue mankis bicikloj, ĉar la luo-sistemo en la apuda tram-haltejo ne funkciis.

Anstataŭ biciklado mi akompanis la grupon kun la 5 hindaj gestudentoj, promeni al kaj en la apuda parko de l'Orangerie. Tre agrabla loko vid-al-vide de la konstruaĵo de la Eŭropa Konsilio. La konstruaĵo por ekzotikaj plantoj estis dediĉita al la edzino de la imperiestro Napoleon, Josephine. Ni ne havis tempon eniri la malgrandan zoo-parkon, sed tre ĝuis vidi

multajn nestojn de cikonioj en alteco de ĉirkaŭ 5 m sur arboj por ĉi-tiu celo preparitaj. Kelkajn ni vidis flugantaj, aliaj prizorgis la neston, kie jam estis rekoneblaj la idoj.

Ankaŭ interese estis vidi la imponan reprezenteton de Turkio proksime de la Eŭropa Jur-kortumo por Homaj Rajtoj, kaj aliflanke mi parolis kun kurdoj, kiuj jam dum multaj jaroj faras inform-standon antaŭ la parko por montri al la neglekto de la homaj rajtoj de la kurda etno en Turkio; i.a. ili celas, ke Turkio finas la izol-malliberecon de A. Öcalan, kaj donus pli da aŭtonomio.



La grupo de Mulhouse-Esperanto proponis tridekon da libroj ĉe la aŭkcia vendado. Ili estis donacitaj de Léone Wermelinger komence de 2018. Bernard kaj Andreo prizorgis la aŭkciadon. Multaj libroj estis proponitaj je 1 aŭ 2 eŭroj, do ege favor-preze. Preskaŭ ĉiuj estis tiel forvenditaj.



Jam proksimiĝis la fino de tiu Esperanto-renkontiĝo en Strasburgo. Ja necesis danki kaj gratuli la organizantojn. Jen Edmond Ludwig

dankas al Bernard Pidancier, kiu akceptis transpreni la organizadon de tiu aranĝo, en la kadro de niaj printempaj staĝoj.



Sed post tiu lasta tagmanĝo estis ankoraŭ programita ŝipa ekskurso por viziti la urbo-centron. Feliĉe la vetero estis tute oportuna por ŝip-veturado per turisma sen-tegmenta ŝipo.

Jam ne plu funkcias la klarigoj en Esperanto, kiel tion Cyril Hurstel sukcesis iniciati.

Sed pli ol 13 lingvoj estis proponitaj kun interesaj historiaj klarigoj pri la urbo.

Revenvoje al la kultur-centro, ni iom hazarde renkontis la baratajn gestudentojn kaj salutis ilin.





TRE SUKCESE FINIĜIS LA MALAGAJ KONGRESOJ

Komence de la monato majo disvolviĝis, kiel anoncite, la Triopa Kongreso de Esperanto en Malago, nome la 78a Hispana Kongreso de Esperanto, la 21a Andaluzia kongreso kaj la 71a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperantista Federacio. Ĝi estis tre kontentiga sperto el ĉiuj flankoj.

“La lingva situacio en Eŭropo” estis la gvida temo de la renkonto, kiu okazis preskaŭ koincide kun la kampanja periodo por la Eŭropa Parlamento kaj kelkajn semajnojn post la (planita, ne ĝistiam okazinta) eliro de Britio el la Eŭropa Unio. Oni programis prelegojn kaj debatojn, kun partopreno interalie de Seán Ó Riain (prezidanto de la *Eŭropa Esperanto-Unio*), Federico Gobbo, Katalin Kovats kaj José María Rodríguez Hernández inter aliaj spertuloj. Krom tiu ĉeftemo, oni plenumis tre riĉan kulturen aktivadon: muzikon, prelegojn kaj teatron. Aparte de grupoj kaj ensembloj reprezentantaj la lokan kulturon, koncertis Grazia Barboni, Kajto kaj Saša Pilipoviĉ, kaj Miguel Fernández respondecis pri muzika, teatra kaj poezia programeroj.



En la jutuba kanalo de HEF

<http://www.youtube.es/esesperanto> iom post iom aperas jam la unuaj videaj registraĵoj de la renkontiĝo, inklusive de prelegoj (ekz. de Federico Gobbo pri eblaj flankefikoj de la Briteliro), kantoj, deklamadoj aŭ instituciaj salutoj dum la inaŭguro. Vidu ĉe tiu ĉi ligilo.

<https://esperanto.us17.list-manage.com/track/click?u=aa80ca7b39320fc114f3ec26b&id=fc511ad3c6&e=3d316b5365>

DONKIĤOTO MANSKRIBITA KAJ PLURLINGVA

Finfine aperis la eldono de la verko Donkiĥoto, manskribita kaj plurlingva, kiun ekpretigadis de antaŭ longe la urbeŝtaro de El Toboso (la urbo de la ĉef-rolulino Dulcinea). Speciala eco estas, ke ĉiu ĉapitro estas en diversaj lingvoj, kaj ili aperas manskribitaj de volontuloj kaj ilustritaj per bildoj ankaŭ de volontuloj. La parto en Esperanto, en kiu kunlaboris Fundación Esperanto, estas la ĉapitro 37 de la dua parto, kaj vi povas trovi ĝin en tiu ĉi ligilo, inter la paĝoj 208 kaj 212. Pli ĝenerala ligilo estas serĉi en la servo de la Bitra Biblioteko de Kastilio-Manĉo, kaj serĉi *Quijote políglota*.



<http://esperanto.es/hef/index.php/295-don-quijote-en-esperanto>

Padovo - Frajburgo - Nancio: ĝemel-urboj



Esperanto ja bone taŭgas por renkontiĝoj inter la ĝemelaj urboj. Ĉifoje al Frajburgo venis gasto el la ĝemela urbo Padovo, D-ino Paola Tosato, prezidantino de Esperanto-grupo Padovo. Ŝi tre interesiĝis pri la historio de nia regiono. Ni vizitis plurajn muzeojn, la ekologian kvartalon Vauban kaj la altajn lagojn en la Nigra Arbaro. Konrad Gramelspacher intervjuis ŝin por la Esperanto-elsendo de Radio Dreyeckland (RDL.de-serĉu "Esperanto"). Venontjare ŝi intencas viziti la alian ĝemelan urbon, Nancio.



Je nia grupa kunveno Paola prezentis Padovon; aparte interese estis, ke ankaŭ partoprenis komencanto el Alĝerio. Kroma informo pri nia ĝemel-urba aktiveco: je la 3-a de Oktobro ni partoprenos la ĝemel-urban feston en Besançon.

Manfred

En 2019 la asocio TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) refoje eldonis sian jaran kajeron, nome KONSTRUADO-Kajero de TAKE 2019.

La ĉi-jara temo estis "Pavimoj".

Refoje ĝi estas tutkolora kun multaj fotoj. Ĉi-sube eblas vidi la kovrilpaĝon kaj apude la enhavotabelon. Daŭre estas akireblaj jam aperintaj numeroj. Tiuj de 2019 kaj 2018 estas koloraj je 8 eŭroj La pli antaŭaj numeroj je 6 eŭroj, mendeblaj ĉe nia kasisto.

Aliĝo al la asocio TAKE estas 8 eŭroj jare.

TAKE CCP 2 549 46 A Strasbourg

KONSTRUADO kajero de TAKE 2019



KONSTRUADO kajero de TAKE 2019



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

N ^o	Titolo	Aŭtoro	Paĝo
1	Enkonduko	La redaktintoj	4
A	Pavimoj internaciaj	Pierre Grollemund (Francio)	5
B	Pavimoj por blinduloj	Jaroslav Matuška (Ĉeĥio)	15
C	La portugala ŝoseo	Pierre Grollemund	22
Ĉ	Sofio pavumita		28
D	Nova sarkofago sur Ĉernobil	Pierre Grollemund	29
E	Baza koncepto de trafiko en urboj	Zlatko Hinšt (Kroatio)	38
F	La kastelo Guedelon	Pierre Grollemund	50
G	La streko Jupiter	Pierre Grollemund	61
Ĝ	Ornamaĵoj sur tegmentoj	Pierre Grollemund	68
H	Utilaj informoj	André Grossmann (FR)	73



**En Suda Koreio, en urbo
Namgang okazis
"Esperanto-vilaĝo"
kun ĉirkaŭ 130 partoprenantoj**

